Bô Yin Râ

LA ALTA CELO

BÔ YIN RÂ

Aŭtora nomo de J. A. Schneiderfranken

3a eldono
Neŝanĝita represo de la 2a eldono aperinta ĉe
Kober’sche Verlagsbuchhandlung en 1961
Unua eldono ĉe Verlag Magische Blätter Leipzig, 1925
© 1972, Kober’sche Verlagsbuchhandlung AG Bern

Gvida parolo

Pli alta ol ĉiuj teraj celoj estas la *alta celo*, kiun la vortoj de tiu ĉi libro volas montri al vi.

Sed *vane* vi provos atingi tiun ĉi celon, se vi eble opinias, ke ĝi troviĝas en *granda foreco.*

La *vojo*, kiu kondukas vin al via alta celo, estas *en vi mem*, kaj nur *en vi mem* vi iam *atingos* la altan celon.

Ankaŭ ĉiu *helpo*, kiun vi bezonas sur via vojo, estos donata al vi nur *en vi mem*.

Nur *en vi mem* vi povas ekpreni la helpantajn manojn, kiuj etendiĝas renkonte al vi.

Ne konfuzu la legadon de la *instruo*, kiu provas *montri* al vi la *celon* kaj volas *gvidi* vin al la vojo kondukanta al la celo, kun la *ekiro* sur la vojo en vi *mem!*

La *instruo* povas alporti al vi benon *nur tiam*, se laŭ ĝia konsilo vi serĉas *en vi mem*.

Nur tiam vi ankaŭ trovos *helpon* en vi mem.

Tial, se la vortoj de tiu ĉi libro gvidu vin al via *alta celo*, vi devos lasi *resoni* ilin en vi mem.

En via *interno* vi tiam trovos la krutan *vojon*, kaj se vi kuraĝe penas grimpe ascendi ĝin, ĝi iam igos ankaŭ *vin* trovi *en vi mem la altan celon*. – –

La voko de la spirito

Ne estis nur prudenta elpensaĵo tio, kio igis la antikvajn saĝulojn ree kaj ree admoni, ke one serĉu la spiriton en la *kvieto* kaj atendu la vokon de la spirito „ĉe fermitaj pordoj“.

Kio tiam povas esti perceptata en la *interno*, tio estos aŭdebla nur al la *animo*, kaj la animo povos nur *sentante* percepti tion, kio ne estas esprimebla per vortoj de iu homa lingvo.

Bone estas al tiu, kiu povas tiumaniere *aŭdi sentante.*

Ne ĉiuj estos kapablaj tuj *percepti* la vokon de la spirito.

Ili ofte devos longe resti en *„preĝado“*, antaŭ ol ilia *interno* estas *malfermata* tiel, ke ili perceptas la vokon *en si mem...*

Kiel nur *akrigita*, *sperta* orelo povas ekkoni la *melodion* de fora kordinstrumenta muziko, dum al aliaj oreloj ĝi restas nur neinterpretebla sonado, tiel same la milda voko de la spirito estas perceptata nur de tiuj, kiuj sukcesis akrigi sian *internan aŭdadon* kaj tiom spertigis sian animon pri spiritaj aferoj, ke ĝi povas *interpreti* tion, kion ĝi perceptas.

Kelkaj homoj, surdigite de la bruego de l’ superlaŭta tago, erarvagas tra la dezertejo, atendante la vokon, kiu povus atingi ilin, sed ne konsciante sian surdecon.

Vane la voko de la spirito provos movi ilin...

Unue tia homo devas ekkoni sian surdecon, por tiam reakiri en la kvieto sian kapablon aŭdi.

Se tiam io spirita reatingas lian internan orelon, li devos lerni persiste *bari* sin kontraŭ la bruego de la ekstera mondo kaj tamen *ne fuĝi for de ĝi.*

Kio ajn ĉirkaŭas lin, ĉiam li devas restigi *sin mem* en la *kvieto*.

La bruego de la tago ne devas penetri en lian *internon*, eĉ kiam ĝi *ekstere* muĝas ĉirkaŭ li per ĉiuj fortoj. −

Kiu volas aŭdi la vokon de la spirito, devas turni sian aŭdadon sole *internen*.

Nur en sia *interno* li povos lerni percepti tion, kio neniam fariĝis vorto...

Bruego kaj muĝado ne surdigos lin, se li kapablas aŭdi en sia interno.

Meze de la ekstera mondo, kiu kvazaŭ maro furiozas ĉirkaŭ li, li estos al si mem *insulo de kvieto*.

La muĝegon de la ondoj kaj la hurladon de l' ŝtormo li lernos ignori, kaj *el la kvieto en li mem* eksonos al li la alta voko de la spirito. –

Faro kaj *agado ne* perturbas la kvieton, kiu tie ĉi estas necesa.

La voko ne povas iam perceptata tie, kie regas la kvieto de l' *morto.*

Nur tie, kie la *vivo* ĵetas siajn ondojn, la interna *kvieto* estos plena je vivo, el kiu la spirito povas generi *ion spiritan* en la homo.

Nur per tiu *generado el la spirito* la homo povas aŭdi la *vokon* de la spirito. Nur per tiu generado la homo povas ricevi *scion* – pri *si mem.* –

Kiu aliamaniere volas aŭdi, ke *li mem* estas vokata laŭ sia „nomo“, tiu devos ĉiam vane atendi …

La voko, kiun li sopiras, povas veni nur de *interne*, kiam la *plejinterno* jam vekiĝis per la generanta potenco de la spirito, potenco, kiu efikas nur en la kvieto. Nur el la *plejinterno de la interno* io spirita estas perceptebla.

La *instruo*, kiu estas donata de *ekstere*, servu al vi nur por prepari vin.

Ĝi *sciigu* vian *internon* pri la spirito, por ke vi iam povu ekkoni la vokon el via *plejinterno*.

La *instruo* ĉiam povas *diri* al vi pri la spirito nur tion, kio estas *direbla*. Sed la *realo* de la spirito povas proksimiĝi al vi nur en *spertado.*

Vi povas ekkoni la vivon de la spirito nur per *spertado en via interno*.

Tial turnu vin per via tuta forto al via *interno* kaj *petu* la spiriton *en vi mem*, ke ĝi veku vian *plejinternon!*

Restu en tiu „preĝado“, ĝis via preĝo estas elaŭdata!

Restigu vin en la *kvieto* kaj en sekura *fido!*

Eĉ via *„preĝo“* ne devas perturbi la *kvieton.* –

Ankoraŭ malpli vi devas *postuli* ion, kio doniĝas al vi *per si mem*, tuj kiam via interno estas *preparita* per la kvieto. –

Atendu vian tagon en *serena trankvileco!* Estu *aktiva* per ĉiuj viaj eksteraj fortoj en la *ekstera mondo*, sed neniam lasu la zorgojn de tiu ĉi ekstera mondo profani la tabernaklon de via *interno!* En via *interno* vi devas, neperturbite de la eksteraj ŝtormoj, ĉiam konservi la *kvieton.*

Neniu bruo de la ekstera mondo devas atingi tiun ĉi internon.

Tiel vi iam – en *via* tago – esploros vian *plej profundan profundon* kaj estos levata al via *plej alta alto.*

Tiel vi iam perceptos la *vokon de l' spirito en vi mem* kaj *ekkoni vin mem* en la spirito. –

En la *vivo de la spirito* vi tiam trovos vin *mem* en la *eterna vivo.*

*

La du vojoj

Pli ol iam antaŭe, estas necese en la hodiaŭa tempo ree kaj ree atentigi pri tio, ke ne ĉio „mistera“, kio ĉirkaŭas nin, kondukas nin al tiu fina kaj plej sankta mistero, kiu sola povas alporti liberigon al la animo.

Eble estas eĉ necese, emfaze averti kontraŭ tro *suprajĝa legado* de tiu atentigo, ĉar la konfuzo de kelkaj cerboj fariĝis tiom groteska, ke ili, en blinda ekzaltiĝo, ne plu ekkonas la plej akran *malkonsenton* pri ilia erara opinio kaj falsas antaŭ si mem la parolon de l' avertanto en plenan konsenton.

De post multaj jaroj – dum jardekoj, kaj jam longe antaŭ la ekflamo de la interpopola murdado, kies malbena atmosfero ankoraŭ nun kuŝas peze sur ĉiu tera okazado kvazaŭ brulodora nubo de sangokulpo – la homaro, fiera pri sia scio kaj sia racionalismo, fariĝis la predo de plej pereiga infekto de sia spirita ekkonado, tiel ke hodiaŭ ĉiu kaŝa vero fariĝas la objekto de groteska satirusa dramo.

Oni do vere ne devas miri, se la serĉantoj venis sur erarajn vojojn.

En ĉiuj tempoj, la fosforeska, trembrilanta lumo de la misteraj limregionoj de homa ekkonado ensorĉe influis impreseblajn homojn, sed nur tre malofte ekzistis sur la tero tiom granda manko de certeco en sentado.

Kiel la tineo estas altirata de la flamo, tiel same la nespertulo, kiu restas sen averto, sentas sin movata rapidi renkonte al tiu ekscitanta ekflagrado el nekonataj regionoj, – sed minacas lin la sama danĝero kaj la sama pereo …

El ĉiuj mucidaj keloanguloj kaj fatraskameroj ekflirtas la tenta delogo. *Trompita duonscio, duon-edukita malsaĝo* kaj *intenca trompo* ĉie provas allogi novajn anarojn kaj sukcesas enkapti ne malmultajn, kiujn oni vere ne supozus en tia anaro.– –

Sed en la fundo de ĉio ĉi troviĝas profunda *sopiro*, kiun la tuta scio de tiu ĉi tempo ne povas trankviligi, kaj kiu sekve devojiĝas, ĉar ĝi ne kapablas mem trovi la ĝustan vojon, kiun fiera trofervoreco sukcesis bari tiugrade, ke nur noktonigraj muroj staras tie, kie en antikva tempo estis atingebla la libereco.

En la homo estas profunde ankrita la antaŭsento de supermondo, en kiu li esperas trovi la solvon de la enigmo de sia ekzisto. Tiu antaŭsento estas nenio alia ol la malforta *rememoro* pri la stato de sia spirito *antaŭ* ties „falo“ en teran ligitecon.

Nun li provas reakiri, kion li iam perdis, kaj dum tiu serĉado li tro facile fariĝas viktimo de mallumaj potencoj, kiujn li ne vidas, eĉ se ili jam antaŭ longe devigis lin sekvi ilian vokon, ĝis li *tro malfrue* rimarkas, ke li erare rigardis la bruletantan ardon de la abismoj de neniigo kiel la teran rebrilon de la vera, viviga *lumo*, renkonte al kiu li komence volis strebi.

Kiu ajn spertas en si tiun impulson strebi al la solvo de ĉiuj enigmoj de la ekzisto, tiu restu bone konscia pri tio, ke

por li ekzistas *du vojoj* kaj ke dependas nur de liaj *pripensemo kaj prudento*, ĉu li elektos la ĝustan, kiu kondukas lin al lia vera celo, aŭ ĉu li en ebria deliro ekiros la brilegantan vojon de trompo. – – – –

Unu el tiuj du vojoj, kiuj montriĝas antaŭ li, kondukos lin al *lumo* kaj *lumiĝo* kaj fine en la regnon de la pura *spirito*, dum la *alia*, sur kiun tiras lin alloge ŝanĝbrilantaj fantomoj, kiuj promesas al li spiritan potencon kaj sorĉan povon, tute certe gvidas lin en pereon, – se ne venas ankoraŭ savo el alta graco kaj li ĝustatempe ekkonas, ke li fidis al *trompa lumo*, kiu havas nenion komunan kun la pura, ore blanka lumo de la Dieco, krom la ĉarmo de kaŝiteco antaŭ teraj sensoj. Sed vere: ne *ĉio* kaŝita estas esplorinda. –

Kvankam la steloj speguliĝas ankaŭ en *lageto*, oni certe ne trafosos ĝian marĉon por esplori ilian misteron. –

Serioza strebanto, kiu portas en si altan sopiron al la esenca lumo de l' pura spirito, certe ankaŭ ne deziras informiĝi pri estonta tera sorto, kvankam li povas avantaĝe uzi kalkulon, kiu, same kiel aliaj teraj kalkuloj, montras al li fluojn, kiuj influas lian agmanieron, dum li vivas kaj agas en la katenoj de terecaj kosmaj fortoj.

Tie ĉi li eble povas lerni saĝe progresigi tion, kio *progresigas lin mem*, kaj kontraŭi tion, kio povas *malhelpi* lin.

Li apenaŭ subfalos al la eraro, ke estas kvazaŭ destinita al li sorto, el kiu li ne povas eskapi. Anstataŭe, li provos nur *solvi la enigmon* de la *ritmo* de sia sorto, por tiam helpe de sia scio utiligi tiun ritmon kun la intenco eviti tion, kio estas *evitenda*, kaj alkonduki tion, kio ŝajnas *dezirinda*. –

Jam *Paracelso*[*] – homo, kiu vere povis scii tion, kvankam li ŝatis priskribi sian saĝon en strange arabeska formo – eldiris jenan multsignifan vorton, kiu vere atestas altan ekkonon:

„La astroj tute ne kapablas okazigi ion; ili estas liberaj por si mem, same kiel ni estas liberaj por ni mem. –“

Kaj plie:

„La infano bezonas neniun astron kaj neniun planedon; ĝia patrino estas ĝia planedo kaj ĝia astro.“

Tio certe ne estu interpretata tiel, ke tute ne ekzistas la influo de teraj kaj kosmaj fortoj, kiun oni atribuis al „astroj“, ĉar oni povis difini ĝin nur per *ilia* ŝajna moviĝo. Sed tio signifas, ke malgraŭ ĉio la libereco avantaĝe *uzi* tiun influon kuŝas tute *en ni mem* kaj baziĝas sur la disciplino de l' propra volo. Sekve ankaŭ ĉi tie la prikalkulado de la *ebloj* estas benoplena nur tiam, se ĝi servas por *memedukado* kaj igas nin streĉi ĉiujn fortojn por fari nian ekziston *libera* de la timo antaŭ ŝanĝiĝantaj tajdoj de nevideblaj fluegoj. Ili trafluas ĉion teran, sed estas rompataj je la diamantaj remparoj, kiujn la nevenkebla potenco de la *spirito* konstruas ĉirkaŭ la *fidanto*, kiu scias peti pri tio per sia *agado* ...

Tia fidanto neniam submetos sin al *orakoloj*, kiuj intencas montri al li la ŝanĝiĝeman bildon de la estonteco kiel *neŝanĝeblan fatalon*; kontraŭe, li certe tute ne deziros ekhavi tiun sciigon.

Eĉ malpli li toleros, ke, por akiri ekkonon, oni lasas homojn fariĝi instrumentoj de abismaj fortoj, tiel rabante al ili iom post iom la potencon regi sian teran korpon.

---

[*] Philippus Aureolus Paracelsus (Theophrastus Bombastus von Hohenheim), Svisa alkemiisto kaj kuracisto; mortis en 1541 (Rim. de la tradukinto)

Neniam li volos *malligi* ilin el la regado de *ilia* volo, por *trudi* al ili *sian* volon. –

En sia tuta agado li servas nur al *tiu* libereco, kiun konas sole la infanoj de la *spirito*.

Ĉiu fenomeno de la ekstera naturo, ĉiu okazaĵo de tiu ĉi tera vivo povas esti fleksata en la direkto al bona aŭ malbona celo. Ke oni povu utiligi tiun eblon en *ĝusta* maniero, al tio servas la instruo de la vokitoj. –

„Ne tiu, kiu diras al mi: Sinjoro, Sinjoro, eniros en la regnon de la ĉielo, sed tiu, kiu lasas energii en sia *propra* volado la volon de *tiu*, kiu, estante mia ‚Patro', generis min el si."

Proksimume tiel parolis antaŭ longa tempo homo, kiu rajtis instrui, ĉar en *spirita* spertado li sciis, pri kio li parolis, kaj kiu vere povis diri pri si:

„Ne el mi mem mi instruas, sed kiel la ‚Patro' ordonis al mi, tiel mi instruas vin."

Sed la saĝo de tiu „granda amanto" estis aliformigata en tera, tro tera maniero, antaŭ ol ĝi atingis la hodiaŭan generacion, al kiu ĝi estas plu apenaŭ ekkonebla en sia pureco.

Lia instruo celis nur al tio, ke la homo de la tero lernu utiligi sian vivon por la *savo* per *agado*. – –

Sed ĉiu nura scio pri la tiom diversvaloraj aferoj, kiuj estas neperceptebla j per la teraj sensoj, formas nur sterilan ŝajnan ekkonon, ne liberigas onin de tera ligiteco. – Sole la sobra *konkludo*, kiu elkreskas el vera *ekkompreno*, povas estigi la *miraklon de liberigo*, se ĝi sukcesas transmeti en *agadon* tion, kio malkaŝiĝis al la animo. Kion oni eble *in-*

struas per vortoj, tio akiros valoron nur tiam, kiam tiu instruo kondukas al *sperto*. –

Bone estas al tiuj, kiuj tiumaniere venas al la spertado de sia *interno* kaj tiam en si mem, en la *plejinterno* de sia interno, atingas la *celon* de la ĝusta vojo!

*

Pri serĉado kaj trovado

Vere estas multe pli facile, kun gesto de serĉanto esplori la *eksteran m*ondon kaj malkovri eĉ la plej sekretajn el ĝiaj profundoj, povante esti certa pri la gloro de eltrovinto, – ol trovi *en si mem* sian *plejinternon*, kiu restas bone kaŝita eĉ al tiuj, kiuj opinias la fortojn de l' animo tiom ekzakte esplorita, ke por ili *la animo mem* dissolviĝis en fantoman nenion. – –

Tial vi silentigu ĉiun orgojlon, eĉ se estus bone konata al vi tio, kio al la plejsaĝuloj de la antikva tempo prezentiĝis kiel malluma enigmo!

Krome, kelkaj enigmoj eble nur *ŝajnas* al vi „solvitaj", ĉar vi povis kontentigi vin per solvo, kiu ampleksas neniom de la *profundo*, el kiu la mistero murmuris sian *demandon* al tiuj antikvuloj ...

Inter la serĉantoj de la antikva tempo estis kelkaj, kiuj sukcesis *trovi*, kaj se vi, same kiel ili, volas fariĝi *trovintoj*, vi devas serĉi *tie*, kie *ili* trovis.

Mi volas helpi al vi serĉi *en vi mem*, ĉar nur *tie* vi povas esperi trovi por vi mem ion, kio ĉiam estis serĉata. –

Nenia pensado kaj neniu sagaca konkludado povas doni al vi instruon, se vi volas trovi finan solvon de tiuj demandoj, kiuj ĉiam denove leviĝas antaŭ via animo el la mallumo de terligita ekkonado, postulante respondon. – – –

Tial ekde nun rifuzu al ĉiu laŭta penso en vi la parolon, ĝis estas trovebla en vi nur tiu granda *kvieto*, en kiu ne plu parolas en vi io, kio iam venis al vi de *ekstere!* – –

Sed tiam lernu la altan arton de *fidoplena atendado!*

Ĝi vere ne estas lernebla *facile*; sed ĉiu, kiu poste *trovis*, kion li sopiris, devis lerni ĝin, kaj povas eviti tiun lernotempon neniu, kiu volas fariĝi *trovinto* en si mem...

Se vi volas *trovi*, gardu vin kontraŭ la tento, ke vi volas *mallongigi* la tempon de atendado!

Vi devus atendi des *pli longe*, se vi malsaĝe subfalus al tiu tento. – –

Jes, vere: kiu ajn ekiris sur tiun vojon de serĉado kaj *ne trovis* sur ĝi tion, kion li esperis trovi, tiu povas esti certa, ke li ne trovis *nur pro tio*, ke li arogante kredis esti destinita por povi *mallongigi* la tempon de kvieta atendado. – – –

Dum tiu strebado ankoraŭ ekzistas en serĉanto, li ne estas atinginta la grandan *kvieton*, kiu estas kondiĉo por ĉiu trovado.

Ĉu li poste rajtas plendi, se lia tuta penado estis *vana?*

Ankaŭ tiu, kiu penas trovi en tiu ĉi *ekstera mondo*, ĉiam vane serĉos, se li ne sukcesas krei en si mem la *kvieton*, kiu estas necesa *ankaŭ tie ĉi*, se li volas fariĝi *trovinto* de tio serĉata. –

Sed *ĉiuj*, kiuj iam serĉis en sia *plejinterno* kaj tie ĉi *trovis* tion, kion ilia sopiro celis, antaŭe praktikis la *arton de atendado* kaj tiel venis al la kulturo de *kvieto*. –

Nur en *plej kvieta enprofundiĝo* doniĝis al ili tio, kion *vane* serĉis miloj, al kiuj mankis *kvieto* ...

„La regno de la ĉielo povas esti perfortata, kaj nur perfortuloj kaptas ĝin.“ Sed tiu ĉi „perforto“ estas nenio alia ol la forto de *membridado*, kiu sukcesas forigi ĉiun maltrankvilecon el la animo. –

Nur kiam vi kreis en vi tian kvieton, ke ŝajnas al vi malsaĝa la demando, *kiam* doniĝos al vi la lumiĝo, vi vere estas

proksima al la plenumiĝo kaj povas plene fidi, ke vi *trovos* tion, kio restis kaŝita al vi, kiam vi, katenite de malpacienco, ankoraŭ klopodis vane. – – –

Devas fariĝi al vi tute negrave, *kiam* vi akiros sur tiu ĉi tero la plej altan ekkonon. Vi devas serĉi kiel iu, al kiu estas metita neniu tempa limo.

Vi devas serĉi kiel iu, kiu *scias*, ke li trovos, ĉar tio, kion li serĉas, *ekzistas* kaj ne *povas* resti kaŝita al li, tuj kiam li mem estas *inda* trovi ĝin.

Ju pli via certeco kaj via *fido al vi mem* kreskas, des pli proksima al vi estos *alta helpo*. –

Kulturu en vi mem profundan *konfidon* kaj evitu la senkuraĝigajn pensojn, kiuj ree kaj ree volas *timigi* vin, sugestante al vi, ke trovado ne estas destinita al vi! –

Lernu ekkoni, ke estas *blasfemo*, se vi fordonas vin al tiu timo! –

Vi portas *en vi mem* la liberigon de ĉiu dubo, – kaj fina certeco povas doniĝi al vi nur *en vi mem.*

Forĵetu de vi ĉion, kio volas *konfuzi* vin en tiu fido al vi mem, eĉ se tio ŝajnis kaj ankoraŭ ŝajnas al vi esti „sankta vero“!

Tie, kie *fina ekkono* doniĝu al vi, ĉiu pensado de la cerboj devas *silenti*, eĉ se ĝi estis plej alte honorata dum jarmiloj. −

Tie vi estas sola kun *vi mem*, kaj neniu tera potenco povas malhelpi aŭ helpi vin.

Sole en via *plejinterno* vi povas esperi trovi tion, kion vi serĉas, kaj ĉiuj mirakloj en foraj stelaj spacoj estos *nenio* por vi kompare kun *tio*, kio tie ĉi estas reservita por vi.

En via *plejinterno* vi vere trovos vin *mem*, kaj nur tiam doniĝos al vi la ekkono, ke via tuta serĉado celis nur – *vin mem*.

*

Pri la eterna lumo

Iĝis mallume en la kabanoj, kaj nigra zorgo kuŝas super la palacoj.

Oni serĉas kaj alportas la oleolampojn por repuŝi la mallumon, oni ekbruligas kandelojn sur la kandelabroj, – sed la tenebro estas necedema.

Aĥ, necesa estas *alia* lumo, se la *ĝojo* revenu al vi!

Sed, geamikoj, se vi portas en vi *fidon*, *tiu ĉi* lumo certe *venkos* la nokton, kiu vin ĉirkaŭas.

Vi ne scias, ke vi *mem* katenas vin al la tenebro.

Ne lasu vin *timigi* de la mallumo, kiun vi vidas etendiĝanta sur ĉiuj viaj vojoj!

Vi mem turnis vin al la *mallumo*, tiel ke tenebro *devas* ĉirkaŭi vin, ĝis ties tempo estas finita kaj vi returnas vin al la *lumo.*

Sed ankaŭ *tenebro* entenas *promeson de lumo.*

Ĝi vekas fortojn, kiuj igas vin *sopiri* la lumon kaj tiel movas vin *returni* ...

Estu *paciencaj* kaj restadu en kvieta *fido!*

Ankoraŭ iom da tempo, kaj vi certe paŝados ree en la *lumo de la suno.*

Eĉ en plej profunda tenebro, la lumo estas ne pli malproksima de vi ol en plej radianta heleco, se vi volas *turni vin mem* al la lumo.

Turnu *vin mem al la suno*, kaj ĉiu *mallumo* kuŝos *malantaŭ vi!*

Tiel la *prapatroj* forte kaj ĝoje paŝadis en la *lumon* kaj lasis malantaŭ si tion malluman ...

Sed iliajn nepojn pli kaj pli logis la *tenebro*. –

Kio *kuŝis malantaŭ ili*, fariĝis pli grava al ili ol tio, kion ili ankoraŭ devis *trapaŝi*...

Ili lernis *rigardi returne* kaj *migri returne*. –

En la *mallumo* ili esperis trovi tion, kio montriĝas nur en la *lumo*.

Sed *vi*, malfruaj nepoj de tiuj nepoj, vere ne devas miri, se *vi*, kiuj delogite de tiuj fruaj turnas sin al la *mallumo*, hodiaŭ estas ĉirkaŭitaj de densa *tenebro.*

Vi devos *returni* vin, se, same kiel tiuj *antikvuloj*, vi volas trovi ankaŭ *vin* en la lumo de la *suno.*

Kuraĝo kaj firma *volo* estas necesaj por tiu returniĝo...

Viaj okuloj jam antaŭ longe *dekutimiĝis* je la *lumo*, kiu *sola* iam povos revenigi vin al la ĝojo.

Nun la *suna lumo* devas unue *dolori* vin, antaŭ ol la okulo akiras forton por ĝin *toleri* kaj tiam lernas ami ĝin ...

Sed multaj jam *atingis* sian punkton de returniĝo, kaj kelkaj jam *estas* returniĝintaj.

Tie ĉi neniu restas sen *gvidado*, kondiĉe ke li *mem kuraĝas* returni sin.

Ho vi *serĉantoj*, kiuj ankoraŭ serĉas *retropaŝante*, ne restadu sur viaj *eraraj vojoj*, kiuj kondukas vin pli kaj pli profunde en la *mallumon!*

Kaj *vi*, kiuj jam antaŭ longe *laciĝis* de la serĉado, ne kontentigu vin per tio, ke vi ekbruligas en viaj kabanoj kaj palacoj mizeran lampon!

Kuraĝe turnu vin al la *eterna lumo*, kaj lasu la tenebron *malantaŭ* vi!

Vidu: – *lumo* kaj *mallumo* konstante estas en siaj lokoj. –

Dependas nur de *vi mem*, ĉu vi volas kateni vin al *konstanta* mallumo, aŭ turni vian rigardon al la *lumo.*

Vere: – al vi ĉiuj lumas *eterna lumo.*

*

Pri la koloroj de la lumo

La *lumo* de la eterna suno entenas en si plej diversajn *kolorojn*, kaj ĉiutempe nur al malmultaj homoj ĝi montriĝas en sia *ore blanka abundo.*

Sed preskaŭ al ĉiuj, krom tiuj malmultaj, ĝi montras nur *unu* el siaj multaj koloroj.

Tie ĉi, neniu *arbitro* povas ŝanĝi tion, kion *leĝo* postulas.

Nur via okulo decidas, en kiu koloro vi ekkonu la lumon.

Vi povas stari meze de la lumo kaj tamen ne ekkoni la lumon, tiom longe, dum vi volas *devigi* vian okulon montri al vi *koloron* de la lumo, kiu *ne estas via.* –

Tiel vi povas persvadi vin mem al ĉiu trompo kaj *malproksimigi* vin tre foren de la lumo, kredante, ke vi proksimiĝas al ĝi.

Vidu, mi bone konsilas al vi, kaj estas la *plenumiĝo* de mia surtera ekzisto doni bonan konsilon al ĉiuj, kiuj volas aŭskulti min. Jen mi konsilas al vi: – *ne falsu* vian koloron kaj ne deziru vidi ion, kio havas *alian* koloron ol tio, kio iam doniĝu *al vi!* –

Ĉiu *vera* ekkono povas doniĝi al vi nur en *via* koloro.

Nur se vi plej zorge rigardas vin mem, vi ekkonos vian *propran koloron ...*

Sed vere *ne* estas necese, ke vi ekkonas ĝin *antaŭe*, kondiĉe ke vi volonte konfidas vin al *tio gvidanta* vin kaj ne plu

volas *mem decidi* pri la koloro, en kiu la lumo de la eterneco proksimiĝu al vi. –

Estas destinite *en vi mem* de eterne, en *kiu* koloro la lumo povas alporti *benon* al vi.

Estas destinite *en vi mem*, kion via okulo *ekvidu.*

Tamen eble atentu tion, kion *aliuloj* povis ekvidi, kaj ekkonu en ĉio, kion ili havas por diri al vi, la *riĉan diversecon* de la lumo; sed restu bone konscia pri tio, ke – kiu ajn vi estas – *aliaĵo* estas rezervita al via okulo, kvankam la *sama* lumo sin montras en *ĉiu* koloro. –

Al vi ĝi povos doni sin nur laŭ *via* naturo, kaj ĉies naturo estas alia. – –

Dum vi ankoraŭ deziras akiri la lumon en vi laŭ la naturo de *aliuloj*, vi *malhelpas* la lumon atingi vin laŭ via naturo kaj en via koloro, kaj tiam ne devas miri, ke vi trovas aliulojn en ilia *lumo*, sed vin mem en konstanta *mallumo.*

Oni instruis vin kaj diris al vi, ke al ĉiuj, kiuj sur tiu ĉi tero strebas al la lumo, iam lumos la *sama* lumo, – kaj vere: tiu instruo radikas en la profunda grundo de la *vero.*

Estas *bone*, fidi al tiu instruo, sed estas ankaŭ necese scii, ke la *sama* lumo disradiadas en *infinitobla diverseco*, tiel ke ĝi povas atingi milojn da miloj kaj tamen sin donas al ĉiu unuopa *aliamaniere* ol al ĉiuj aliaj. –

Unufoja kaj *unika* estas la memmanifestiĝo de la lumo en *ĉiu* el ni, kaj al ĉiu la lumiĝo doniĝas nur laŭ *lia* maniero. – –

Sed kiu *ricevis* en si la lumon, tamen scias, ke lumas al li la radioj de la *sama* lumo, kiuj ekenergiis ankaŭ en ĉiuj liaj fratoj ricevintaj la lumon same kiel li. – –

Al neniu doniĝis *alia* lumo, sed ĉiu vidas en si la *saman* lumon en alia *koloro*. – –

En la lumo de la eterneco tiel estas entenata *senfina riĉeco*.

Ho, mi dezirus, ke mi povus komprenigi al vi ĉiuj, kiuj strebas al la lumo – kiel plantoj, kiujn oni vintre tenas en kelo –, la *abundan diversecon* de la lumo!

Ho, mi dezirus, ke mi povus priskribi al vi ĉiuj en homaj vortoj la *neelĉerpeblecon* de via eterna heredaĵo!

Sed mi bone scias, ke ĉiu homa parolo restas mizera balbuto, se eternaj aferoj manifestiĝu en ĝi. – –

Same kiel homo, kiu vidis forajn miraklojn de tiu ĉi tero dum longa vojaĝo, mi tie ĉi povas nur provi, veki *imagon de tio neniam vidita de vi*. Sed se vi *mem* volas ekvidi en vi tion, kion mi havas por sciigi al vi, tiam vi devas voli *mem* ekiri la vojon, kiu je sia celo kondukas vin *en via propra plejinterno al propra vidado*, kaj vi estos certa pri la tuta gloro, kiun mi tie ĉi esperigas al vi.

Ĉu vi estas rigardata kiel saĝulo de tiu ĉi tero, aŭ ĉu oni vidas en vi nur homon, kiu akiris malmulton da tera saĝo, – sciu, ke la lumo de la eterneco certe povas doniĝi al vi, se vi estas preta serĉi ĝin en *vi mem*.

Defendu vin kontraŭ allogaj voĉoj, kiuj volas persvadi vin serĉi la lumon per la okuloj de *aliaj* homoj!

Anstataŭe, serĉu ĝin en *vi* en *via* maniero kaj sciu, ke ĝi iam povas doniĝi al vi nur en *via propra* koloro, indiferente, ĉu vi atingas ĝin jam dum la surtera vivo, aŭ nur post kiam vi devis lasi la teran veston al malkomponiĝo!

Kun trankvila kuraĝo ekiru *vian* vojon, la vojon konforman al vi, kaj kion ajn vi laŭ via naturo esperas, tio vere estos multe superata de tio, kio iam fariĝos via *propraĵo! – – –*

*

Pri la alta celo

Vere, estas longa, kruta kaj kruda la vojo, kiu kondukos vin al via *alta celo*, sed kiam vi *ekkonas*, kio atendas vin je la fino de l' vojo, certe *ĉiu* vojocelo, kiun tiu ĉi tero povas prezenti al vi, ne havos por vi iel kompareble altan valoron.

Je la atingita alta celo de l' vojo, atendas vin juvelo, kiun *neniu* krom *vi* povas iam posedi.

Kvankam al *sennombraj* doniĝas tie ĉi la *sama* premio de venko, tamen por *ĉiu* atinginta la altan celon estas gardata trezoro, kiun *nur li* povas elfosi.

Neniu alia tie ĉi povas akiri tion, kio estas rezervita al *vi*.

Vi mem devas veni por elfosi tiun trezoron.

Tie ĉi, *preterlaso* estas *fordono*, ĉar eterne neniu krom vi povos fariĝi proprietulo de tiu trezoro.

Ekkomprenu, kion tio ĉi signifas!

Bone ekkonsciu la valoron, kiun vi portas *en vi mem!*

Sciu, ho serĉanto, ke *io spirita* povas fariĝi atingebla al vi nur tiam, se vi akiris certecon en vi pri tio, ke vi portas la *vojon* kaj la *vojocelon* en *vi mem!*

Nur en via *plejinterno* estas trovebla la *alta celo*, pri kiu ĉi tiuj vortoj volas sciigi vin.

En via plejinterno estas kaŝita trezoro, kiun vere neniu povas rabi al vi.

Tie ĉi, nur *vi mem* povas trompi vin pri via propraĵo per via propra malsaĝo.

Mi tie ĉi vidas vin tremi kaj subfali al la *timo*; sed vi interpretus miajn vortojn vere malsaĝe, se vi timus, ke vi ne povos superi la obstaklojn leviĝantajn inter vi kaj via celo.

Nur sentima *kuraĝo igos* vin *atingi* la celon! – La celon, kiu kaŝiĝas en *vi mem!* – –

Vidu, mia amiko, estas infana ludo atingi eĉ la plej altan *eksteran celon surteran*, – sed heroa ago atingi la altan celon, kiun oni portas en si mem. – –

En la *ekstera* vivo *aliuloj* povas malhelpi vin atingi la celon, kiun vi deziras atingi; – sed *tie ĉi* ekzistas nur obstakloj, kiujn vi *mem* kreas en vi mem.

Vi *mem* povas forŝovi flanken *ĉiun* obstaklon en vi mem, se vi serioze *volas*, kaj alta helpo tiam donos al vi forton.

Sed kiom ajn forte vi petas spiritan helpon, ĝi tamen povos atingi vin *nur tiam*, kiam via volo energias en la *sama* direkto, en kiu la alta helpo progresigu vin.

Vi devas fariĝi kvazaŭ *magneta* por tiu helpo, se ĝi estu altirata de vi. –

Tie ĉi ne estas ebla iu *arbitro* de la helpantaj fortoj, ĉar ĉiu eblo doni al vi helpon estas ligita al organe efikanta leĝo. –

Same kiel diversaj *mesaĝoj* trarapidas la spacon en ondoj de *elektra* forto kaj tamen ne povas atingi vin, antaŭ ol ili trafas aparaton taŭga por kapti la ondojn, tiel ankaŭ *alta helpo* estas ĉiam proksima al vi kaj vi ne rimarkas ĝin – krom se vi ŝanĝas *vin mem* en spiritan ricevilon por ĝiaj *spiritaj* ondoj. –

Tuj kiam vi estas organe ‚konektita‘ al tiu alta helpo, vi ne plu bezonas iel zorgi kaj vi atingos vian altan celon kun plena

certeco, – ĉu jam en tiu ĉi surtera vivo, aŭ nur post kiam vi redonis vian korpon al la tero. – –

Via alta celo estas la perfektiĝo de vi mem en via praorigina spirita formo.

Neniu *alia* povas iam en la eterneco perfektiĝi en *via* spirita formo.

En la malaltaj regionoj de la fiziksensa naturo vi ja povas trovi samspeciajn individuojn ofte de tia simileco, ke ŝajne ekzistas neniu diferenco inter ili, sed la observado de *pli altaj* specioj montros al vi, ke ĉiu pli alta ŝtupo rezultigas tian *diversecon* de la *individuoj*, ke eĉ *nesperta* okulo devas rimarki ĝin.

Tiel ankaŭ en la regno de l' spirito ekzistas kvazaŭ *diverseco de ‚specioj'*. –

Ekzistas tie ĉi kvazaŭ *„malaltaj"* specioj, kies individuoj *ŝajnas* esti egalaj, kaj ekzistas *pli altaj* kaj *plej altaj* specioj, kies individuoj montriĝas pli kaj pli *diferencaj* inter si. – –

Al kiu ajn de tiuj specioj vi apartenas, vi sciu: ke vi de eterne estas neŝanĝeble difinita en vi mem kaj *individue apartigita* de ĉiuj aliaj apartenantaj al la sama specio kiel vi!

Ĝenerale dirite, certe estas destinita al vi la *sama* alta celo, kiu lumas al *ĉiuj*, kiuj estas naskataj el spirito en la sino de la eterneco, kaj tamen la *formo*, en kiu la alta celo estas atingebla al vi, estas diferenca de *ĉiu* formo, en kiu *aliaj* povas atingi ĝin. –

De eterne vi portas en vi mem la nur *unufoje* el spirito kreitan formon, kiu estas la *via*, kaj kiun eterne nur VI povas atingi, eĉ se ĝi fariĝus atingebla por vi nur post eonoj.– – – –

Eble vi jam longe estas sur la vojo al via alta celo, sed tamen ankoraŭ ne ekvidis ĝin, ĉar vi volis fari el *aliula* alta celo *vian* celon. –

Vi troe *malfidis vin mem* kaj kredis trovi nur per *aliuloj* tion, kio valorus la penon de serĉado. Vi ne sciis, ke en tiu maniero vi faris vin mem via *malamiko.*

Vi ne sciis, ke vi pekis kontraŭ vi mem, kiam vi volis fari *aliulan* celon *via* alta celo. –

Hodiaŭ, kiam vi legas tiujn ĉi vortojn, pentu al vi mem kaj ekde nun serĉu nur *en vi mem* la altan celon, kiu estas atingebla por neniu krom *vi!*

Eble *via* alta celo ankoraŭ kaŝiĝas en granda malproksimeco, eble vi nuntempe povas apenaŭ antaŭsenti ĝin, ĉar ĝi ankoraŭ estas vualita al via okulo per densaj nebulvualoj, – sed tamen vi gajnis ion nekompareble pli grandan, ol se ĉiuj altaj celoj de *aliuloj* fariĝus mane palpebla al vi.

Nur post la atingo de via *propra* alta celo prezentiĝos al vi la *perfektiĝo.*

Nur se vi sukcesas trovi vian *propran* altan celon, vi atingis por vi *la* altan celon. – –

Tie ĉi, vi mem estas sago kaj arko kaj alta celo. – – –

Vi atingu *vin mem* en via plej alta spirita formo!

Neniu dio povas liberigi vin, dum vi ne vidas *en vi mem* antaŭ viaj okuloj la altan celon, kiu estas nur VI MEM, unuigita kun via Dio. – – –

*

Pri la vojoj de la antikvuloj

Estus malsaĝe, ho serĉanto, se vi opinius, ke la vojo al la lumo, kiu estas *la vojo al vi mem*, estas irebla nur laŭ la maniero de la *antikvuloj*.

Sed same malsaĝe estus, se vi volus en *via* tempo *ridi* pri la vojoj de la foraj *antikvuloj*.

Ankaŭ tiuj, kiuj *antaŭ* vi paŝadis sur tiu ĉi tero, vere sciis serĉi kaj trovi, – kaj ili estis *trovintaj* multon, kiun iliaj postvenintoj *perdis*.

Vi povas nur *gajni*, se vi lernas rigardi la vojojn de la antikvuloj atente kaj sen antaŭjuĝo.

Ili *ekkonis* aferojn profunde kaŝitajn, pri kies ekkono la posteuloj klopodis *vane*, kaj kiujn viaj samtempuloj rigardas kiel eternan enigmon. –

Lernu senti *respekton* antaŭ la antikvuloj, se *vi* volas atingi ekkonon en *via* vivotempo! – –

Sur tiu ĉi tero naskiĝis ankoraŭ neniu, kiu venis al ekkono ne starante sur la fortaj ŝultroj de siaj antaŭuloj. –

En ĉiu tempo *malsaĝuloj* serĉis ion *„senekzemple novan“*, kaj tamen generado kaj naskado ĉiam dependis de la samaj kondiĉoj.

Tiel ankaŭ vi neniam venos al vera spirita ekkono de vi mem, se ne en esence la *sama* maniero kiel tiuj *antikvuloj*, kvankam la *formo* de serĉado ŝanĝiĝas kun la tempoj. –

Ĉiu tempo havas sian *propran* formon de serĉado kaj trovado, sed se vi provas esplori tion *esencan* en ĉiuj formoj, vi facile ekkonos, ke ĝi ĉiam restas la *samo*. –

Ankaŭ *vi* serĉu nur en la formo de *via* tempo, kaj ne lasu vin forlogi al serĉado vestite per malnovaj pruntitaj *kostumoj*.

Vi farus nur maskeradon kaj, kiel teatra heroo, kredus plenumi kolosan agon, se vi volus alproprigi al vi la formon de la *antikvuloj*, por pruvi vian taŭgecon.

Vi *povas* trovi *nur*, se vi penas serĉi en *via* formo, kiu ĉiam estos la formo de *via* tempo.

Kiu konsilas al vi *ion alian*, tiu transdonos vin al la eraro, eĉ se li mem ne scias, ke li per tio malhelpas vin. – –

La *saĝuloj* de *ĉiu* tempo serĉis en sia *propra* maniero kaj en la formo de serĉado de *sia* tempo.

Tiel ili fariĝis *trovintoj*. – –

Sed ili ankaŭ tre estimis la serĉadon kaj trovadon de *pli fruaj* homoj, kaj estis tre malproksima de ili la intenco nomi siajn prapatrojn „malsaĝaj“. – – –

Eble multo en malnovaj raportoj ŝajnas al vi stranga nur tial, ke vi ne plu povas *interpreti* ilian lingvaĵon.

Aliaj skriboj eble tre konfuzas vin, ĉar ili parolas per vortoj konataj al vi pri aferoj, por kiuj oni hodiaŭ certe *ne* uzus la *samajn* vortojn. –

Krome, oni iam kun saĝa *intenco* konfidis ion al malluma dirmaniero, tiel ke la vera *senco* de la vortoj estas apenaŭ ekkonebla, ĉar ĝi devis malkaŝiĝi nur al *tiuj*, kiuj posedis la *ŝlosilojn* de tiuj dirmanieroj.

La veraj vojoj de la antikvuloj hodiaŭ estas plej diversmaniere kovritaj kaj kaŝitaj, kaj nur *malklare* vi povas *senti*,

ke ili vere estis vojoj, kiuj kondukis al la *celo*, – al la *sama* celo, kiun ankaŭ vi volas atingi. –

Estas danĝera la provo reirebligi la tiel ŝutkovritajn vojojn.

Nur tre malmultaj sukcesas forigi senreste la ŝutkovraĵon, kaj eĉ se ili sukcesis, la vojospuro montriĝas tiom elviŝita, ke ĉiu plupaŝado estus tute arbitra ...

Se vi volas vere esti disĉiplo de tiuj saĝaj *antikvuloj*, vi devos, same kiel ili, ekiri nur *tiun* vojon, kiun *via* tempo preparis por *vi*. –

Ankaŭ tiuj saĝaj antikvuloj estis infanoj de *sia* tempo, kaj kvankam ili *honoris* la vojojn de siaj patroj, ili tamen bone sciis, ke, same kiel iliaj patroj, ili povis atingi la *celon* nur sur *propraj* vojoj.

Ankaŭ *vi* honoru la vojojn de la *antikvuloj*, sed ne penu regajni ilin de sub la ŝutkovraĵo, ĉar kion ajn vi povus trovi, tio estus nur sciigo pri la vojoj de *aliuloj*, kaj vere: tiumaniere *via* vojo estas *neniam* trovebla! – –

*

Pri la beno de laboro

Ekzistas en la nuna tempo sennombraj homoj strebantaj al *spirita disvolviĝo*, kaj kvankam troviĝas ankaŭ multaj, kiuj englutas ĉiun sciigon pri altaj spiritaj aferoj nur por kontentigi sian nesatigeblan *scivolemon*, tamen multe pli multaj estas rigardendaj kiel seriozaj serĉantoj de la *vero*.

Ili pilgrimas al ĉiuj fontoj, kaj ĉiuj lokoj, kiuj estas famaj pro miraklecaj okazaĵoj, estas sanktaj por ili.

El la skribaj postlasaĵoj de ĉiuj tempoj oni elserĉas malnovajn librojn, en kiuj oni esperas trovi ekzaktan instrukcion pri tio, kiel oni povus ligi la miraklon al la ĉiutaga vivo, ĉar jam antaŭ longe oni aŭdis pri altaj fortoj, kiuj laŭdire montriĝas atingeblaj por tiuj, kiuj ekkonas la eternan leĝon de la *spirito*.

Oni ja povas rideti pri la malsaĝo de homoj, kiuj deziras lerni la *sorĉadon*, sed ankaŭ multaj arde strebantaj al la *spirito* ne estas liberaj de malsaĝo, kaj, aĥ, kelkaj kredas, ke io spirita estas atingebla al ili nur tiam, se ili submetas sin al ekstera instruado, kiu postulas de ili fari laŭeble strangajn *ekzercojn*.

Ili akceptas jen tiun, jen alian instrukcion, kiun ili trovas en novaj aŭ malnovaj skriboj, en kiu aventurema mistagogo, mistere murmurante mallumajn vortojn, prezentas sian konfuzan saĝon.

Kiam ajn oni renkontas ilin: – ĉiufoje ili *finfine* malkovris la *ĝustan* recepton por trovi la ŝtonon de la saĝuloj en sia fandvazo.

Admirinda trajto je ili estas, ke ili paŝas de *seniluziiĝo* al *seniluziiĝo* kaj neniam perdas la strangan kuraĝon subfali al ĉiu nova trompo. – –

Daŭras ofte longan tempon, ĝis ili malkovras, ke *tiumaniere* la alstrebata alta celo devas *ĉiam* resti *neatingebla* al ili. –

Nur malfacile ili lernas kompreni, ke estis riproĉinde malvasta opinio, kiu igis ilin pensi tiom malalte pri *tio plej alta* kaj *plej sublima*, – ke tion, kio estis sankta al la saĝuloj de ĉiuj tempoj kiel plej alta posedaĵo, oni rigardis atingebla per „spiraj ekzercoj“ en pozicioj de kvazaŭa elartikiĝo aŭ per eĉ multe pli malbona farado laŭ konfuza instrukcio de konfuzaj kapoj. –

Sed la homo estas tre ema klini sin antaŭ io *stranga* ...

Li multe preferas iri sur kurioze angulaj vojoj, kiujn lia okulo ne povas sekvi, kaj *ebriigite de iluziado* lasas sin konduki en *mallumon*, ol serĉi la rektan vojon al *lumo* por tiam tramigri ĝin en matenfreŝa *sobreco* kaj kun firma paŝado kiel migranto, kiu ĉiam *atentas* la direkton de l' vojo, por ke li iam atingu ties *celon*. – –

Certe oni devas havi forton, se oni volas tramigri longan vojon, kaj kiu ne volas malleviĝi lacigite antaŭ ol atingi la celon, tiu devas zorgi, ke sur la vojo li trovu refortigaĵon.

Tiel ankaŭ la vojo al la spirito necesigas forton kaj refortigon por ĉiu, kiu volas iri sur ĝi.

Sed oni ne bezonas serĉi malproksime kaj ekiri dubindajn flankajn vojojn, por ricevi tiun refortigon.

La ĉiutaga vivo donos abundon da ĝi, se oni scias vivi ĝuste.

Ankaŭ tie ĉi nur malmultaj scias, kiom grandaj estas la *fortigo* kaj la *forto-renovigo*, kiuj fluas el ĝuste farita *laboro*.–

Multe pli oni ŝatas luli sin en altaj revoj kaj rigardas la laboron nur kiel *obstaklon* sur sia vojo, – kiel ĝenaĵon por sia paŝado, kiun oni laŭeble evitas ...

Sed kiu opinias, ke *tiumaniere* oni povas atingi la celon, tiu certe *ne* atingos ĝin, eĉ se li konas la saĝon de ĉiuj saĝuloj el ties *vortoj* kaj ĉiutempe donas sin al altaj, solenaj *animstatoj*. – –

Estas multe pli facile *malestimi* siajn ĉiutagajn devojn ol *plenumi* ilin.

Multe pli facile estas, en solena animstato senti sin „proksima“ aŭ eĉ „unuigita“ al la spirito de Dio, ol fari sian *laboron* tiel, ke ĝi plifortigas la propran spiriton kaj rezulte igas ĝin taŭga por iam *vere* ricevi la konsekron. –

Vere valoroj estas kaŝitaj tie ĉi, kiuj valoras la penon atingi ilin.

Certe vi jam spektis cirkoludojn kaj estis plena de admiranta mirego, vidante tie homojn tiajn kiaj vi, kiuj tiom disvolvis siajn korpofortojn kaj bridis sian volon, ke ili povis fari akrobataĵojn, kiuj estus tute neeblaj al vi ...

De ili vi povas lerni.

Same kiel ili akiris sian *korpoforton* per senĉesa *aktivado*, tiel vi povas hodiaŭ ĉerpi neatenditan *spiritan* forton el *ĉiu laboro*, kiun vi faras tiumaniere, ke neniu alia povus fari ĝin *pli bone*. – – –

Same kiel tiuj cirkaj akrobatoj devas, en *plej strecita memkoncentrado*, atenti ĉiun manan aŭ alian movon, por ke ilia laboro sukcesu kaj ilia vivo ne venu en ekstreman danĝe-

ron, tiel ankaŭ vi devos, se via laboro fariĝu al vi *spirite* fruktodona, ĉiam plenumi ĉion, kion ĝi postulas de vi, kun tia *koncentriĝo*, kvazaŭ via *vivo* dependus de ĉiu laŭkutima „manmovo“. – – –

Ĉu pleje viaj *pensoj* aŭ pleje viaj *manoj* estas uzataj en via laboro, ĉiam temos pri multo de tiaj „movoj“, kiujn vi faras preskaŭ sen konsciiĝi pri ili en maniero „pure mekanika“ kaj laŭkutima, tiel mem malaltigante ilin ...

Tiumaniere ili certe aperos al vi tedaj kaj monotonaj.

Sed kiel tiuj aŭdacaj akrobatoj, kies laboro ŝajnas al vi esti gaja ludo, devas en ĉiu vespero, kiu vokas ilin al la sama laboro antaŭ spektema homamaso, ĉiam *denove* atenti ĉiun plej delikatan muskolmovon, ĉar la *sama* akrobataĵo ja povus malsukcesi je la *hodiaŭa* vespero, kvankam ĝi sukcesis *hieraŭ*, – tiel ankaŭ vi devos klarigi al vi, ke la *sama* „manmovo“ ĉiam estas *io nova*, kiom ajn ofte vi eble faris ĝin. –

Kiom ajn „monotona“ aŭ „lacige enua“ via laboro eble ŝajnas al vi: *atentu* ĝin kaj ne ankoraŭ malpliigu ĝian valoron antaŭ vi mem, – tiam vi malkovros, kiel vi povas *liberigi* ĝin el ĝia monotoneco, *aŭ* vi faros tiun saman „manmovon“, tiun ĉiam saman faradon, kiun via laboro postulas de vi tagon post tago, ĉiam kun *nova konscio*, tiel ke via spirito trovos mil novajn aspektojn de la *sama* afero. – –

Eduku vin mem al tio, ke vi sentas *ĝojon* pri via laboro, eĉ se ĝi tute ne ŝajnas taŭga por kaŭzi ĝojon al vi! – – –

Venku vian *antipation* kontraŭ ĝi, kaj vi estos *supera* eĉ al la plej teda laboro; – vi igas ĝin alporti al vi *ĝojon* per *via maniero rigardi ĝin!*

Se vi povas libere elekti la intersekvon de diversaj laboroj, elektu unue tiun, kiu estas plej *antipatia* al vi, kaj provu *ami* ĝin!

Kiam vi venkis vian plej fortan antipation kaj vi tiel montriĝis *pli forta*, *tio* jam *sufiĉos* por alporti al vi *ĝojon*, kiu ŝanĝos ankaŭ ĉiun pluan laboron en ĝojon. –

Vi neniam devas rigardi vian laboron nur kiel *rimedon* por akiri la *bazajn necesaĵojn* por via *vivo*. –

Tie ĉi la plej multaj homoj eraras.

Certe, ĉiu *laboro valoras sian pagon*, kaj vi mem faras vin kulpa, se vi servas al maljustulo, kiu eble rifuzas doni al vi tion, kion li *ŝuldas* al vi kiel *laŭvaloran* rekompencon por via laboro. – – –

Sed tio, kio *apartenas* al vi kiel frukto de via laboro, estas precize difinita spirite. Vi faras vin ne malpli kulpa, se vi eble lasas doni al vi *pli* por via laboro ol la valorkreskon, kiun ĝi havigas al tiu alia, por kiu vi laboras, – kaj vi neniam devas forgesi, kiugrade tiu aliulo eble per *sia* laboro *nerekte* kontribuas al la via. – – –

Sed ĉiu ekstera pago por iu laboro restas nur malgrandaĵo kompare kun tio, kion via laboro povas alporti al vi en la formo de *spiritaj* valoroj, se vi scias estimi ĝin kiel *laboron pro la laboro.*

En la bone farita laboro mem estas entenata ĝia *plej alta* valoro, kiun neniu povas deteni de vi, – kiun neniu povas *rabi* al vi. –

Eĉ en la *plej malalta* laboro oni povas strebi al *plej alta perfekteco*, kaj se ĝi estas atingita, tiel, kiel nur plej intensa

memdonado povas atingi ĝin, tiam la natura sekvo ĉiufoje estas senmezura *pligrandiĝo* de *spirita* forto. –

Laboristo, kiu ĉiutage faras nenion alian ol permaŝine torni ŝraubojn, povas tiumaniere aperigi en si *altajn spiritajn fortojn*, dum aliulo, kiu siaopinie vivas nur en altaj spiritaj aferoj, sed atentas multe pli siajn misterajn tremsentojn ol la *bonan kvaliton de la laboro* komisiita al li, ricevas *absolute nenion* kaj trompas sin mem, se li kredas, ke liaj spiritaj fortoj kreskas. – –

Por akiri la spiritajn fortojn riceveblaj per laboro intensa kaj celanta la plej altan *rezulton produktitan en la unuo de tempo*, ne estas necese, ke la *speco* de la laboro mem servu al io spirita. –

Kvankam la *daŭra* frukto de la tiel farita laboro konsistas en konstanta kreskado de *spirita* forto, tamen estus malsaĝe ne atenti la *aliajn* fruktojn, kiujn tiu *disciplina* laboro alportas ankaŭ al la *ĉiutaga vivo*. – –

La plej multaj homoj ankoraŭ ne scias, kion *tia* laboro signifas ankaŭ en la *ĉiutaga vivo*, kvankam ili vere povus ekkoni tion el ne malmultaj ekzemploj. –

Nur *laboro pro la laboro:* laboro, kiu celas la *plej altan rezulton*, – povas krei la sopiratan ĝeneralan *prosperon*, kiu estas neniam atingebla, dum laboro estas nur *tolerata* kiel io *ĝene necesa.* – – –

Scias ankoraŭ nenion pri la *beno* de laboro *tiu*, kiu ne lernis *ami* sian laboron. – Neniam ĝuos la *benon* de laboro tiu, kiu revas pri *feliĉo*, al kiu mankas la *laboro.* – –

*

Pri la potenco de la amo

Vere, la potenco de l' homo estas sen limo, se li vivas en la *amo*.

Vere, la *amo* estas la plej alta forto de la tera homo. –

Oni laŭdis tre altajn fortojn kiel la plej altan valoron de l' homo, kaj reve imagis al si plej altan brilon de la homo sur alta krenelaro; sed estis preparita al la tera homo *multe pli alta* gloro, ol lia propra imago povis antaŭsenti, kaj la potenco donita al li estas pli vasta ol la vasteco de lia plej aŭdaca pensado. – – –

La ĉieloj ne povas enteni tion, kion *fortoj de amofajro* scias efektivigi en la koroj de teraj homoj, kaj en neniu abisma profundo estas sondebla la loko, kie estas ankrita la konsekro, kiu el *homoanimaloj* kreas diece transfiguritajn *spiritajn homojn*. – – –

Sunoj forpasas en kosmaj tajdoj kaj tiras *mondojn* kun si en la abismon de neimagebla pereo; sed la potenco de la *homo* restas donita al li *por eterne*, eĉ se la grundo, sur kiu li konstruis sian portempan kabanon, ŝanceliĝas kaj disrompiĝas sub liaj piedoj.

Li, kiu iam falis el alta lumado, tamen portas en si la potencon levi sin alte super ĉiujn stelojn.

Vi demandas, kio donas al la iam falinta homo tiom altan potencon?

Vi demandas, kio levas lin super ĉiujn nevideblajn princojn en la kosmo?

Sciu: la vorto de la lingvo tie ĉi ne kapablas formi finan respondon, kaj nur plej profunda *sentado* tie ĉi povas *senti* tion, kio estas sentebla, sed apenaŭ komprenebla. – –

Kiel povus homa lango iam esprimi tion, kio restas super ĉiu homa pensado?

Eĉ al tiuj altaj stelpotenculoj, kiuj laŭ ilia naturo estas nur plej pura *„pensado“* kaj tamen staras alte super ĉiu tereca pensado, – al tiuj nevideblaj „dioj“ de tiu ĉi videbla mondo, – restas eterne vualita tio, kion nur la *plejinterno* de la homa *animo* povas *sperti* en si en plej profunda vidado. – –

Pli alten ol la plej alta potenco de tiuj dioj en la kosma okazado, sin levas la *homa potenco*, kiu baziĝas en la *amo!*

„Dio estas amo, kaj kiu restas en amo, tiu restas en Dio, kaj Dio restas en li.“

Sed al vi la *„amo“* fariĝis tro parenca al la *volupto*, fariĝis al vi dolĉa sentado de voluptoplenaj sentoj; kaj anstataŭ *vivi* en *„Dio“*, *vi mem* starigis la *idolon*, antaŭ kiu vi *genuas* kaj kiu vere ne povas helpi vin, tiel ke la prudentuloj, kiuj ekkonis tiun trompaĵon, deturnis sin de ĝi kaj nun estas nomataj de vi „malkonfesantoj de Dio“, ĉar ili aŭdace pridubas kaj neas la „diecon“ de via *idolo.*

Sed mi diras al vi, ke iu, kiu tiumaniere deturnis sin de idoloj kaj dioj, eble estas *pli proksima* al Dio ol tiuj, kiuj insultas la deturniĝinton. – – –

Mi diras al vi, ke multaj el tiuj, kiujn vi nomas malkonfesantoj de Dio, vere estas ŝirmataj en Dio kaj spertas Dion en la amo, kvankam ili ne parolas en via maniero kaj eble mem ne scias, ke ili estas en la amo kaj ke Dio manifestiĝas en ili!–

Ĉar:

„Dio estas Spirito, kaj liaj adorantoj devas en la *spirito* adori la *veron*.“

Kiu ne serĉas la *spiriton* en si mem, tiu eterne ne trovos *Dion.*

Sed la *spirito*, kiu estas *Dio* kaj estas la *amo*, ne devas esti rigardata kiel egala al la „spirito“ de la *penso*, spirito, kiu povas esti kreata en pensado en la cerboj de ternaskiĝintoj.

Tie ĉi la parolo vere estas pri *alia* spirito, kaj kiu ne per sentado ekkaptas ĝin en *amo*, tiu restos *sendia*, kiom ajn multe li eble scias paroli pri Dio. – –

Nur en la spirita formo de la *amo* la tera homo povas veni al *Dio* kaj tiel en la spiriton, el kiu li originis per la *vorto de vivo*, kiu parolas sin *mem* en dieco de eterne ĝis eterne. –

Antaŭe lia tuta psalmado pri „Dio“ kaj „tio Dia“ estas nur malsaĝa babilado, kaj lia tuta „preĝado“, se ĝi ne baziĝas en *tiu* amo, estos vana! –

Kiu iam instruis vin „preĝi“ tiel, kiel oni preĝu, ne ripetadante kiel homoj malproksimaj de Dio, tiu volis vidi vin en *tiu* amo.

Lia tuta *vivo* estis lia instruo pri tiu *amo*.

Kiel vi povas kompreni lin, dum vi ankoraŭ hezitas dissolvi kaj fordoni vin mem en la sama fajro de amo, por tiam denove gajni vin en tiu amo?

Tiu ĉi amo, pri kiu mi tie ĉi sciigas vin, estas neniam tute atingebla, dum vi ankoraŭ bezonas *objekton* de amo, objekton kiun vi devas serĉi *ekstere* de vi.

Vi mem devas fariĝi al vi objekto de tiu ĉi amo, ĝis fine vi perdas *ankaŭ vin* en ĝi kaj tiel *mem* fariĝas *amo*, kiu ne plu bezonas objekton, pro tio, ke ĉio, kio iam fariĝis aŭ povas fariĝi, estas ampleksita en ĝi!

Se oni konsilas al vi per saĝa konsilo, ke vi rezignu eĉ pri *via animo*, vi komprenu tiun konsilon nur tiel, ke vi ne devas fari eĉ vian animon *objekto* de via amo, se vi volas sperti en vi mem *tiun* amon, kiel kiun *Dio* sin malkaŝas en vi.

Se vi ankoraŭ volas *proprigi* al vi *ion alian* ol tion, kio en via plej profunda „mi“ volas konscii sin mem, vi ankoraŭ „amas“ laŭ terece malvasta maniero kaj tiel restas malproksima de tiu *esenca* amo, kiu estas *spirita formo de la Dieco*.

Vi ankoraŭ ne *„estas“*, ĉar tio, kion vi nomas via *„ekzisto“*, ne estas vera, pri si mem konscia *esto*.

Tio, kion vi nomas via „ekzisto“, povas esti nomata „esto“ nur en figura senco, same kiel tio, kion vi rigardas kiel „amon“, povas nur figurasence esti nomata *amo*. –

Tio, kion vi nomas via „ekzisto“, estas miloble *kondiĉata*, same kiel ĉiu amo, kiu ligas sin al *objekto*, ĉiam restas kondiĉata de *io ekstera*, kiom ajn alte vi levas ĝin antaŭ vi mem. –

Mi devas konduki vin *fore trans* kaj *alte super* ĉion ĉi, se mi volas gvidi vin al tiu *amo*, en kiu via *Dio* povas naski sin al vi, kaj *vi* en *Li* ...

Supren venos nur tiu, kiu en si mem „sin levas“ por ribeli kontraŭ ĉio malalta, kio volas kateni lin al sia malaltaĵo.

Vere, jam temas pri ribelo kontraŭ ĉio malalta, se vi serĉas „objekton“ de amo, ĉar vi tie ĉi malklare sentas, ke vi devas *kontraŭ*stari tion malaltan, se vi volas venki ĝin.

Sed tiom longe, dum vi ankoraŭ serĉas la „objekton“ de via amo *ekstere*, vi ne povas bazi vin en *vi mem*, kaj tial unue vi *mem* fariĝu al vi „objekto“ de via amo! –

Kiam vi tiumaniere bazis vin *en vi mem*, tiam povas fariĝi pli facile al vi fordoni ankaŭ tiun lastan apogilon kaj „levi vin“ kontraŭ vi mem, gis vi alvenas tie, kie estas *nek* alto *nek* profundo, tial, ke ĉiu spaca komparo neniiĝas, ĉar *io senkompara* tie ĉi *fariĝas evento*. –

Vidu: la ĉieloj ne povas enteni tion, kio estas rezervita al la homo, kiu ne volas rezigni sian *rajton!*

Post eonoj ja *ĉiuj* homoj atingos la „beatecon“, sed la „beateco“ tiel atingebla al *ĉiuj* tute ne estas komparebla kun la *alta celo*, kiun vi povas atingi, se vi jam dum via surtera ekzisto provas lukte suprenigi vin kaj sukcesas malligi vin el la katenoj de la kosmaj potenculoj, kiuj povas teni vin ĉirkaŭvolvita dum jarmiloj kaj dum eonoj.

Sed pri tio estas dirite, ke neniu povas trovi liberigon, *„ĝis li pagos la lastan kodranton*[*]*“*.

Hodiaŭ vi ankoraŭ havas la eblon eskapi el tiu kateniteco.

Hodiaŭ vi ankoraŭ povas fariĝi majstro de via sorto, kaj tiuj el viaj teraj fratoj, kiuj jam antaŭ longe fariĝis tiuj majstroj, ne konas pli altan feliĉon, ol ke ili povas helpi vin ...

*

[*] kodranto (Biblio: Mat. 5:26): roma monero de tre malalta valoro [rim. de la tradukinto].

La majstro el Nazareto

„Se mi parolus la lingvojn de homoj kaj anĝeloj, sed ne havus amon, mi fariĝus sonanta kupro aŭ tintanta cimbalo.“–

Tiel parolis iu, kiu *sciis* pri la amo. – –

Sed estis *iu alia*, kiu *antaŭe vivis* tiun amon en la alta, nepereonta instruo de sia *vivo* ...

Li, kiun ni nomas la *plej granda* el ĉiuj amantoj, estis *antaŭsentita* de multaj el siaj fratoj, sed neniu *atingis* la ardon de lia amo.

Multaj venis *post* li, kaj multaj ankoraŭ *aperos*, kiuj vere povas esti nomataj *„amantoj“*, sed malgraŭ ilia amoforto neniu *estis* kaj neniu *povos* estiĝi, kiu estus komparebla kun li, – kvankam mi tie ĉi parolas pri liaj spirite unuigitaj „fratoj“.

Tamen, kio iam malkaŝiĝis en *ĉiu* el liaj fratoj, tio ĉiam estis *la samo*, kiu malkaŝis sin en li *en sia tuta abundo*.

Kaj kio ankoraŭ *povas* revelaciiĝi dum la fluo de la tempoj, tio estos nur *la samo* en ĉiam *nove formita* revelacio. – –

Estas nur freneza *eraro*, se oni opinias, ke la figuro de la ĉarpentisto el Nazareto apartenas al pia *mito*. Sed tiu, kiun la posteularo konas nur en desegnaĵo, kiu nur jarcentojn post lia surtera vivo estis arbitre formata, aspektis *alie* ol la fakireca faranto de mirakloj, kiun oni formis el li en tempo, kiam la superstiĉoj de orientaj kaj okcidentaj cerboj jam longe luktis pro lia bildo ...

Kiu vere volas esplori la spuron de la *vero*, tiu devas lerni *forigi* la aldonaĵon de terligitaj, mirakloavidaj generacioj el la bildo, kiun li ekde frua juneco rigardis kiel ion netuŝeblan.

Nur tiam la okulo de l' alta majstro brilos al li, kaj li vidos la vizaĝon de *homo*, kiu – *unuigita kun Dio*, en la plej profunda senco de tiu vorto – tamen, kiel *homo*, alportis al la homoj de tiu ĉi tero *„bonan mesaĝon"* el tiu regno de la vivanta *spirito*, kiun li nomis *„la regno de la ĉieloj"*. – – –

Se mi en mia verkaro parolas pri *aliaj* – kiel pri mi mem –, ke ili estas liaj „fratoj", ĉiu interpretus miajn vortojn erare, se li opinius, ke ni aliaj volas egali al la *magia bildo* – tiom fora de la tero –, kiun oni subskribis per la *nomo* de tiu ĉi ĉarpentisto el Nazareto en malfrua tempo, kiam oni celis egaligi lin al la „logoso"*.

Malproksima de ni estas tiu malsaĝo.

Tiuj, kiuj per sia dubinda arto volis tiumaniere doni al li sekuran pozicion en la plej altaj ĉieloj, faris lin fremda al *ĉio terhoma*, tiel ke li estas ne plu ekkonebla al tiuj, kiujn li volis konduki al la *plej altaj* spiritaj altoj.

Ne estas mirige, ke li finfine fariĝis al ili *mito.*

Vidu, geamikoj, mi tre bone scias, pri kio mi parolas, kiam mi nomas la *plej grandan el ĉiuj amantoj* la alta „frato"!

Neniu el ni, kiom ajn alten la spirito eble levis lin, iam dirus la *frenezaĵon*, ke li – la parolanto – estas la *„Pravorto" mem*, kiu parolas el li, kaj tial ni pensas, ke estas krima *insulto*, se oni kredas, ke tiu *plej granda* el ĉiuj amantoj estis sufiĉe vanta por doni sin al tiu frenezaĵo ...

* Esperantigita formo de la greka vorto *„logos"* (Rim. de la tradukinto).

Ni volas montri lin al vi kiel tiun, kiu li vere *estis*, kiam li, egale al ni, portis la teran penadon, – kiel tiun, kiu ankoraŭ *nuntempe*, estante la frato de siaj fratoj, unuigita kaj ekkonebla al ni en sia spirita formo, sin montras al ni tagon post tago.

Se ni, kiuj treege alte honoras lin, nomas nin liaj *„fratoj“*, tio signifas nur, ke li en sia terhoma formo *estis* unu el la *niaj* kaj ke ankaŭ en sia *spirita* formo li *restas* unu el la *niaj*, kvankam oni en fora, mirakloavida tempo faris el la *„filo de homo“*, – kiu spertis en si *ĉion homan*, kiam li vivis sur la tero, – la „Dion“, kiu devis malsupreniĝi el sia dia gloro, ĉar la venĝema idolo de malgranda antikva popolo laŭdire ne povis bridi sian koleron, antaŭ ol la propra „filo“ sin prezentis al li kiel oferon. – –

Ni ne parolas pri iu, kiun ni konas nur el malnova, malluma sciigo. –

Kun tiu, pri kiu ni sciigas vin, ni estas tiel *unuigitaj*, kiel neniu surtera maniero iam povas unuigi homon kun homo.

Ni *scias*, se ni ne scius *aliamaniere*, *pere* de *tiu*, pri kiu ĉi tie temas, ke li iam paŝadis sur tiu ĉi tero kiel homo, komparebla kun ni en ĉiu homa rilato, sed ke li estis tiom supera al ni je *forto de amofajro*, ke li povis fari la supertere altan miraklon: ŝanĝi la spiritan aŭron de tiu ĉi tero tiel, ke ĉiu homo, kiu havas „bonan volon“, nun povas en la *amo* trovi la vojon returne al la spirito, – vojon kvazaŭ „pretigitan“, same kiel migranto tra alta neĝo ne maltrafos la vojon, kiun pretigis iu, kiu konas la ĝustan vojon ...

Tiumaniere, vere *lia propra* sciigo atingas vin per nia vorto.

Se vi vidas je ni la signojn de *homo*, kvankam ni devas montri nin al vi kiel liajn „fratojn“, vi sciu, ke li, egale al ni, estis vera *homo*, al kiu *nenio* homa restis fremda. –

Nenio homa ŝajnis al li tro malalta, ol ke li ne estus iam sentinta ĝin en si mem, en propra spertado. –

Li ne *estus* estinta tiu, kiu li *estis*, se ne la tuta gamo de ĉio homa estus trovinta spacon en li por fari sian efikon.

Al li vere ne estis donita iu potenco *eligi* sin el sia homeco, se li iam estus *volinta* eligi sin el ĝi.

Sed ke li finfine restis *venkinto*, tio konsistigas lian grandecon, same kiel ĉiu, kiu volas sekvi lin, montriĝas „elektita“ nur tiam, kiam li estimas kiel „nenion“ la teran malsaĝon, el kiu li *neniam* povas plene eskapi, kaj kiam li lernas eligi sin el ĉiu „pekokulpo“, por leviĝi en la *lumon de savo*, konsumante sin mem en la fajroardo de tiu *amo*, kiu en la majstro, al kiu li povas *unuigi* sin nur en *amo*, efektivigis la altan miraklon de lia vivo ...

Kiu esperas trovi la *„Grandan Amanton“* en la plejinterno de la interno *en si mem* − ĉar li vere estas tiom proksima al ĉiuj teraj homoj, ke li estas facile trovebla −, tiu antaŭ ĉio devas lerni forigi el si la eraran iluzion, kiu formis el la plej pura *homo*, kiun la tero portis, la „Dion“, kiu sin prezentis al sia patra Dio kiel oferon por repacigi frenezan venĝosoifon, elpensitan laŭ homa, tro homa maniero!

Nur *tiam* li povos aŭdi en si la altan majstron: − la saĝan ĉarpentiston el Nazareto.

*